August Heinrich Hoffmann,

# Vespera kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ree vesperiĝas
ĉie en la rond',
paco subeniĝas
kaj ripozas mond'.

Riveret' nur fluas
ĉe la roko jen,
kaj ĝi daŭre bruas
plu kaj plu sen ĝen'.

Ne vespero iu
endormigas ĝin,
sonoril' neniu
je la tago-fin'.

Mia koro, tia
estas ankaŭ vi!
Pacon trovos mia
koro nur en Di'.

. . .

August Heinrich Hoffmann,

# Vespera kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Surkampare iĝas
ree nun vesper',
milde subeniĝas
paco de l' eter'.

Nur de l' roko bruas
rivereta flu',
kaj la akvo fluas
ĉiam ĉiam plu.

Ne haltigas iu
ĝin je l' tagofin',
kaj vesper' neniu
ripozigas ĝin.

Mia kor', senlace
strebas ankaŭ vi,
vi ripozos pace,
nur se volos Di'.

. . .

August Heinrich Hoffmann,

# Abendlied

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Nun vesper' fariĝas
Ree tie ĉi,
Paco subeniĝas
Kaj ripozas ni.

Rivereto fluas
Ĉe la roko sen
Ĉeso kaj ĝi bruas
Plu kaj plue jen.

Sonoril' neniu
Ripozigas ĝin,
Ne dormigas iu
Ĝin je l' tagofin'.

Tia, mia koro,
Estas ankaŭ vi.
Donu, ho Sinjoro,
Pacon vi al ĝi.

. . .

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de* August Heinrich Hoffmann *(Hoffmann von Fallersleben, ∗1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2013-01-27.*

*Arg-645-1943 (2014-01-28 23:29:57)*

*La melodio estas aŭdebla en* `http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html`*.*

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de* August Heinrich Hoffmann *(Hoffmann von Fallersleben, ∗1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1988-04-16.*

*MR-212.1 / Arg-645-1302 (2012-11-04 23:01:54)*

*Pri la aŭtoro vidu la vikipedian retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben`*. La melodion verkitan de Christian R. Rinck oni povas aŭdi en* `http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/abendwir.html`*. Pri la komponisto rigardu:* `http://de.wikisource.org/wiki/ADB:Rinck,_Johann_Christian_Heinrich`*.*

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de* August Heinrich Hoffmann *(Hoffmann von Fallersleben, ∗1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2012-11.*

*Arg-645-1378 (2012-11-27 18:34:25)*

*Vidu ankaŭ:* `http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied_(Fallersleben)`*. La muziknotoj troviĝas en* `http://www.lieder-archiv.de/abend_wird_es_wieder-notenblatt_300026.html`*, la melodio estas aŭdebla en* `http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html`*.*